Posttagmeze okazis la kutima laborkunsido de la estraro de **HEF** kun la ceestantaj estraroj de la esperantistaj grupoj kaj delegitoj de **HEF**-sekcioj. Sekve estis iu prelego en Esperanto far de S-ro Llibert Puig Gandía, Prezidanto de **Centro Esperanto Sabadell**, anstataŭ la planita de de S-ro Juan Régulo Pérez ĉar ĉi tiu ne povis ĉeesti la Kongreson. La prelego titoliĝis "Esperanto kiel intergenta lingvo" kaj temis pri la problemaro de la etniaj minoritatoj kaj la rolo kiun Esperanto devos ludi en ties solvado. Llibert Puig disvolvis tre kompetente la temon pri la lingvoj de la homaj malplimultoj, kiu rezultis tre interesa por la ĉeestanta esperantista publiko.


En la Solena Malfermo de la Kongreso

Merkrede, la 18an de julio, je la 10a horo matene komenciĝis la Fakaj Kunsidoj, t. e. kunvenoj de la diversaj sekcioj: **ILEI**, **HEFA**, **MEM** k.t.p. Tiu de **MEM** estis la unua Ĝenerala Asembleo de la Hispana Sekcio de **Mondpaca Esperantista Movado**. Sekve okazis la Oficiala Akcepto de la kongresanoj en la Urbodomo de Gijón fare de la Urbestro J. M. Palacio, kiu, per paroladeto, dankis la esperantistojn pro ilia vizito kaj deziris al ili sukcesan kongreson. Respondis al li elokvente la Prezidantino R. Urueña, kiu menciis la gastamecon de Gijón kaj la lokajn esperantistajn pionirojn.

Vespere la kongresanaro tanslokiĝis al la urbokvartalo "El Coto", kie oni inaŭguris straton kun la nomo "ESPERANTO". Je la 6a horo vespere oni faris la ekzamenon por la akiro de la oficiala titolo "kapabla esperantisto" de **HEF.** Partoprenis en tiu ekzameno grandparto el la gelernintaro de la lastaj kursoj de nia E-Grupo.

Je la 8a horo, en la teatrejo de la **Labora Universitato** okazis astur-folklora spektaklo de elektitaj tipaj dancoj kaj kanzonoj far de la **Gijona Polifonia Koruso** kaj de la **Grupo de Ĥoroj kaj Dancoj**. La festivalo atingis kompletan sukceson; estusiasmigis la geesperantistojn la fakto ke, je la fino, la Asturia himno estis fajne kantita en Esperanto far de ambaŭ artaj grupoj kune. El la kvar Esperantaj versioj ekzistantaj de tiu himno, en tiu okazo oni kantis la version de Alfredo Villa.

Ĵaŭde, la 19an de julio estis tago destinita al la kongresa ekskurso. Frumatene eliris tri aŭtobusoj destine al Kovadongo. Sed unue la ekskursa ekspedicio iris al Ribadesella kie la esperantistoj povis viziti la faman antikvan groton **Tito Bustillo**. Temas pri gravega kaverno kie la kongresanoj admiris miljarajn pentraĵojn iam faritajn de niaj praŭloj sur la ŝtonmuroj de tiuj kavernoj. El tie la kongresaj ekskursantoj iris al Kovadongo, grava historia loko de nia lando kiu jam altiris la intereson kaj la viziton de la partoprenintoj de antaŭaj kongresoj de Esperanto en Asturio. Kvankam la vetero ne estis belsuna, tamen la tuttaga ekskurso estis agrabla. En la Baziliko de Kovadongo estis meso en Esperanto oficita de pastro Cortina kaj kun prediko de pastro Fuentes. Fine de la Diservo la "Infana Ĥoro" de la Baziliko kantis la himnon de Kovadongo en Esperanto, laŭ la traduko farita de samideano Alcibiades González Meana. Elirinte el tiu akto, oni faris la oficialan foton de la Kongreso, kiun ni prezentas sur la sekva paĝo. Indas mencii ke en ĉiuj gravaj aktoj de la Kongreso oni abude fotis far de "Foto Angel"; ĉi tiu profesia fotisto, Angel, estis esperantisto de nia urbo, partoprenintо en iu el la kursoj kiujn gvidis Santiago Mulas dum la antaŭaj jaroj. Ĉiutage en la Kongresejo estis publike prezentitaj la fotoj faritaj la antaŭtagon por ke la kongresano akiru tiujn kiuj interesus al ili.

La ekskurso sekvis per la translokiĝo al Cangas de Onís, kie oni faris la tagmanĝadon, por eliri poste destine al Villaviciosa kie la kongresanaro vizitis la Cidro-farejon "El Gaiteru" kaj ties kelojn plenajn je cidro-tinoj. La fabrikestro afable invitis la geesperantistojn gustumi la bongustan trinkaĵon tie ellaboritan (cidro kaj ĉampano). Post unuhora ripozado en Villaviciosa, la ekskursantoj revenis al Gijón.